*Gong Xiaofeng* (Arko). La kongreson partoprenis 300 esperantistoj el 28 provincoj en Ĉinio, kaj el Japanio, Koreio, Italio kaj aliaj landoj. La du plej allogaj eventoj okazis la 16-an de novembro: la inaŭguro de Internacia Esperanto-Muzeo en la Universitato de *Zaozhuang* antaŭtagmeze kaj la KER-ekzameno posttameze.

Laŭ la raporto de s-ino Arko la oficejo pri internacia komunikado de la loka universitato donis nekredeble multe da atento kaj helpo por la pre-sado de la testoj kaj por organizaj laboroj. Ĉina Radio faris intervjoun, kaj pluraj ĉinoj esprimis sian deziron trapasi la ekzamenon venontjare. Menciindas, ke apud la ĉinaj kandidatoj, kiel la sola eksterlandano submetiĝis al la testado *Lee Jungkee*, estrarano de UEA.

[GK 522]

## Du filmoj aldoniĝis al la Reta Kinejo

Lastatempe du filmoj aldoniĝis al la Reta Kinejo de UEA. La unua estas registaĵo de la programero "La nova Estraro sin prezentas" en la 98-a Universala Kongreso en Rejkjaviko. La programero daŭris unu kaj duonan horojn, sed por pli komforta spektado la filmo estas dividita en tri partojn. Unue prezidanto *Mark Fettes* kaj la ses aliaj estraranoj prezentas sin, rakontante pri sia esperantistiĝo kaj antaŭa movada agado. En la dua parto ĝenerala sekretario *Martin Schäffer* rakontas pri la novstila labormaniero de la Estraro kaj prezidanto Fettes skizas la ĉefan enhavon de la ĵus akceptita Strategia Plano de UEA. La fino de la dua parto kaj la tuta tria parto konsistas el la demandoj de la publiko kaj la respondoj de la estraranoj.

La alia filmo, "La Zamenhofa revo", estis registrata jam du jarojn pli frue en la 96-a UK en Kopenhago en 2011. Temas pri la prelego de *Davide Astori* el Italio en la Internacia Kongresa Universitato. La plena titolo de la prelego estis "La Zamenhofa revo inter lingvistika kaj religia planizado: interpopola dialogo kaj tutmonda interkompreno per Esperanto kaj homaranismo".

Ankaŭ tiu ĉi filmo estas dividita en tri partojn, kiuj daŭras po ĉ. 15 minutojn. La prelego mem konsistigas la du unuajn partojn, dum la tria parto enhavas la postan diskuton, en kiu unu el intervenintoj estis la intertempe forpasinta zamenhofologo *Zofia Banet-Fornalowa*.

Ambaŭ filmoj estis registrataj kaj redaktitaj de *Francisco L. Véuthey*.

La nova Estraro sin prezentas:

1-a parto: <http://www.youtube.com/watch?v=tm-JLxHZP6Y>

2-a parto: <http://www.youtube.com/watch?v=z1NtS0tc-ik>

3-a parto: <http://www.youtube.com/watch?v=BAeO2o9FWMA>

La Zamenhofa revo:

1-a parto: <http://www.youtube.com/watch?v=stW8V1AZ-VM>

2-a parto: <http://www.youtube.com/watch?v=2Eu-vs4EYwI>

3-a parto: <http://www.youtube.com/watch?v=EeLy4QfP-E8>

[GK 520]

# Forpasis Rüdiger Sachs (1927–2013)

**R**üdiger SACHS, longjara prezidanto de ISAE kaj ĉefredaktoro de ties bulteno (naskiĝis la 13-an de aŭgusto 1927 en Völkershausen, Germanio; mortis la 21-an de novembro en Eschwege) estis veterinaro kaj profesoro pri parazitologio.

Sachs de 1949 al 1954 studis veterinaran medicinon en Gießen. Post doktoriĝo en 1955 li en 1956 daŭrigis la studadon pri tropikaj epidemialoj malsanoj kaj parazitologio kadre de DAAD-stipendio ĉe la universitato de Ĉvaneo (tiam nomata Pretoria). Sekvis 6-jara laboro en suda Afriko (štata veterinaro en Namibio 1957–1963), 6-jara laboro en orienta Afriko (scienco esploro pri malsanoj de sovaĝaj bestoj en la Nacia Parko Serengeti (Tanzanio) 1964–1967, kaj docenteco ĉe universitato en Nairobi (Kenjo) 1967–1969). Ekde 1969 li estis membro de la sciencistara stabo de la Instituto pri Tropika Medicino en Hamburgo kun sekva plurjara esplorlaboro en diversaj afrikaj landoj (1972–1978).

Ekde 1979 li estis direktoro de la laboratorio de la Hamburga Tropika Instituto en Liberio: esplorlaboro precipe pri homa dormomalsano kaj

pulma paragonimozo en Liberio, kun komparaj studoj en Ebur-Bordo (1983/1984), Peruo (1985) kaj ĉe la Albert-Schweitzer-Hospitalo en Gabono (1986). Pro la liberia intercivitana milito li devis antaŭtempe fini sian laboron kaj foriri el Afriko en junio 1990.

Sachs habilitiĝis en 1978 ĉe la hamburga universitato pri la fako parazitologio kaj en 1986 estis vokita profesoro kadre de la fakaro biologio.

Ekde 1983 li estis instrukomisiito por Esperanto en la lingvosciencia fakaro de la hamburga universitato.

Sachs estis plenrajta membro kaj vic-senatano de AIS San-Marino kaj prezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE, la unua fakasocio de UEA). Li vivis en Eschwege (Germanio) kaj havis duan loĝejon en Italio en Tavoleto, proksime de San-Marino. De 1956 li estis edzo; liaj kvin gefiloj ĉiuj naskiĝis en Afriko.

RB, laŭ *Vikipedio*

# Forpasis Lena Karpunina



**L**a 4-an de novembro 2013 forpasis pro serioza malsano la membro de la Akademio de Esperanto, Lena Karpunina, rusino loĝanta en Germanujo. Ni havis la eblecon kunlabori kun ŝi de la jaro 2010, kiam ŝi es-

tis elektita al la Akademio, ĉefe pro siaj meritoj en la literatura kampo. Ŝi faktte laboris en la Sekcioj Literaturo kaj Konsultejo de la Akademio. Bonvolu vidi la artikolon pri ŝi en [eo.wikipedia.org/wiki/Lena\\_Karpunina](http://eo.wikipedia.org/wiki/Lena_Karpunina).

Ŝi estis 51-jara.

La prezidanto de la Akademio esprimis al ŝiaj familiianoj la kondolencojn de la tuta Akademio.

*La estraro de la Akademio de Esperanto  
[Numero 24 – 2013 11 06]*



# Fidela esperantisto, bonfaranto estas for

**P**ia karega *Arvo Karvinen* forpasis trankvile dum la sunlevigo la 6-an de oktobro 2013.

La funebra festo okazis en silento inter familiaroj kaj proksimaj geamikoj. Prelato *Ari Suutarla*, Steleto-ano, trafe kristaligis la personon de Arvo jene: Arvo estis serĉanto kaj trovanto. Por Arvo bona vivo kaj prizorgo de homoj en- kaj eksterlande estis ja granda emo. Celkonscie li trabatis vojon al handikapuloj. Arvo servis kiel ekzemplo por gejunuloj kaj plenkreskuloj, kiuj serĉis sian lokon en la socio.

En la festo kantis Steleto-anoj *Aatu Moilanen* kaj *Raimo Tanskanen*. La triopo Aatu, Arvo kaj Raimo ekde la blindullernejo kantis kune en diversaj renkontiĝoj. *Juha*, la plej aĝa filo de Arvo, planis kanti kune kun Aatu kaj Raimo anstataŭante Arvon. Pro emocio Juha povis nek kanti nek legi sian kortušan prezenton pri la vivo de Arvo. Ĝin legis lia edzino *Saija*.

Ni funebras, sed kiel bele diris *Börje Eriksson*: "samtempe dankeme memoras lian entuziasmon fari la mondon pli facile atingebla por ĉiuj homoj pere de la internacia lingvo Esperanto".

Dudek jarojn mi havis okazon servi kiel asistantino de Arvo en diversaj projektoj, en hobiaj kaj private. Pere de la pretigo de liaj prelegoj en la angla kaj en Esperanto al mi iĝis konataj i.a. edukado kaj enlaborigo de vidhandikapuloj, en- kaj eksterlanda agado de *Lions Club* kaj evolulanda kunlaboro. Agrable estis labori kun li. Kun peza koro mi akompanis lin ĝis lia lasta ekspiro. Arvo havis fortan senton de respondeco kaj fidon al volontula kunlaboro. Li multon instruis al mi. Mi perdis varmkoran, helpeman kaj instigan amikon. Humile, dankeme mi klopodas sekvi lian ekzemplon kaj plenumi liajn pensojn. "Kiel ondo tiras ondon



tra la oceano, tiel ankaŭ ni sukcesos subtenante unu la alian". "Niin kuin aalto uitaa aallon vallameren yli, niin selviydymme mekin toinen toisiamme tukien" (*Risto Rasa*)

Honorante la belan memoron de Arvo ni daŭrigu la laboron. La prezidanto de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), s-ro Anatolij Masenko, admonas: "Ni klopođu realigi almenaŭ ion en tio, kion sugestis Arvo, kaj tio estu plej bona monumento por li".

La resumo de vivprotokolo de Arvo troviĝas en Vikipedio kaj Panteono de meritplenaj pedagogoj kaj agantoj por Esperanto. Eblas lasi kondolencojn kaj rememoraĵojn en Panteonon (<http://edukado.net/biblioteko/panteono?iid:128>).

La memoron de Arvo eblas honori pere de porblindula fonduso fondita de Arvo: Suomen Näkövammaissäätiö, FI7940554020030175. El eksterlando: Suomen Näkövammaissäätiö, PL 61, FI-00030 IIRIS, FINNLANDO, IBAN: FI7940554020030175, BIC: HELSFIHH, banko: Aktia, Helsinki, ref. "Memore al Arvo Karvinen".

Koran dankon pro la afablaj kondolencoj.

*Ritva Sabelli*

# Forpasis Jerzy Fornal (1926–2013)

**J**erzy Fornal – la lasta el la famaj, profesiaj aktoroj, kiuj laboris pri la esperantoteatro forpasis, la 31-an de aŭgusto 2013.

La 31-an de aŭgusto atingis Jerzy Fornal la lastan momenton de sia laboro en tiu ĉi mondo. Post sia multjara kaj altkvalita prezentado de diverspecaj unupersonaj prezентadoj, li trankvile endormiĝis en Varsovio en ĉeesto de sia filino Tamara. Li pasigis sian lastan tempon en la vivo kun sia filino, kiu multon faris por faciligi lian vivon post la morto de *Zofia Banet Fornalowa*, kiu subite forlasis nian mondon la 19-an de septembro 2012. Tio estis forta bato al ili ambaŭ.

Jerzy Fornal prezentiĝis sian repertuaron en pluraj landoj de la mondo. Dum pluraj jaroj ekde la 1980-aj jaroj li kaj la verkisto *Harold Brown* travivis grandan ĝojon renkontiĝi kaj kunlabori. Ili ofte diskutis pri esperantoteatro kaj pri sia propra kuna laboro. Ili forte fekundigis la idearon kaj pensojn de unu la alia. Mi, kiu kunvivis kun Harold Brown kaj kiu aranĝis plurajn turneojn en Svedio por Jerzy Fornal ofte renkontis ilin kune kaj povis aŭskulti ilian gajan kaj kreivan interparolon pri ĉio de la monda literaturo ĝis kiel plej bone substrekis kaj montris iujn detalojn en ilia propra laboro. Estis feliĉaj momentoj aŭskulti la du inteligentajn kaj kreivajn "kulturlaborantojn" naski novajn ideojn kune. Ili estis kiel du knabetoj ludi feliĉigajn ludojn, kiuj multe riĉigis la esperantan teatron kaj la esperantan kulturon. Mi esperas, ke ni ĉiuj, kiuj havis la bonsancon travivi iliajn kreajojn por ĉiam portos tion en niaj koroj.

En Högsby/Oskarshamn, kie loĝis Harold Brown estis prezентitaj du premieroj, "EDUKO DANĞERA", kiu pere de eventoj dum la franca revolucio, kiu tiam 200-jariĝis, montras ke la sinteno de la homo ne ŝangîgas, kiam la jarcenetoj ŝanĝîgas. "VAGABONDO" kvazaŭ biog-



rafia prezентado surscenigis unuan fojon 1992 dum la Kultura SEF-kongreso en Oskarshamn. "VAGABONDO"-n Jerzy Fornal prezentiĝis lastan fojon dum la entombiga ceremonio de Harold Brown. Oni ŝoke travivis kiel la akso de la vivo rompiĝis. Eĉ homoj en la publiko, kiuj ne komprenis Esperanton, venis plurfoje diri kiel ili ŝatis kaj "kompreenis" la prezентadon. Tio klare montras la altkvaliton de lia laboro.

Famis la prezентado de "ANIARA", verkitata de la Nobelpremiito *Harry Martinsson*, tradukita de *William Auld* kaj *Bertil Nilsson* kaj aranĝita por Jerzy Fornal de *Gunnar Gällmo*. Tiu priskribas kiel oni jam dum la 1950-aj jaroj vidis nian mondon senstiratan ŝanĝeliĝi en la Universo. Vidante Jerzy Fornal prezentiĝin oni vere travivis la lastajn horojn de nia mondo.

*"Mi memoras kaj ofte pensas pri kiam vi kaj Harold vigle interparolis pri diversaj eblecoj de Esperanto-teatro. Salutu Harold de mi, kiam vi renkontos lin kaj vi ambaŭ sidos sur la argenta rando de la nubo denove parolantaj pri esperanto-teatro!" Datūrigu sur la nubo vian gajan interparolon, vian kreivan kunlaboron por esperanto-teatro. Ne ripozu en paco! Vivu kune en ĝojo! NI MEMORU VIN!"*

Kerstin Rohdin

# HELVETINKÄVIJÄ – Kohtaaminen

Esperanton Maailmankongressi on suurin ja vai-kuttavin vuosittainen esperantotapahtuma, jossa luodaan mm. katsaus esperanton kulttuuriin.

Prahan kongressissa 1996 meitä istui joukko esperantoksi kirjoittavien kirjailijoiden lukija-tapaamisessa. Edessämme seisoil punaiseen collage-paitaan pukeutunut vanha mies ja luki ot-teita teoksestaan *Inter vivo kaj morto* – Elämän ja kuoleman vällillä. Mies oli *Julius Balbin*, juutalainen, joka selvisi hengissä saksalaisten tu-hoamisleireiltä.

Jo 15 vuotta ennen Prahan kongressia osui silmiini Brasiliassa ilmestyvässä Fonto-lehdes-sä runo, joka järkyttäävyydessään jää mieleen. Sen jälkeen löysin Balbinin runoja eri esperanto-lehdistä. Né kertoivat keskitysleirien tapahumista ja kauheuksista.

Julius Balbin oli Puolan juutalainen, jonka filosofian opiskelun keskeytti 1939 Toinen maail-mansota. Miljoonien juutalaisten tavoin häkin perheineen ja sukulaisineen joutui saksalaisten kuolemanleireihin, joissa joutui viettämään lä-hes kolme vuotta: *Plaszwissa*, missä joka päivä tapettiin sellaisia, jotka eivät enää jaksaneet työskennellä tehokkaasti, ja missä psykopaatti-nen leirin komentaja ampui vankeja oikkujen-sa mukaan; *Wieliczkan* suolakaivoksissa, missä häntä seisotettiin pakkasessa; *Mauthausen* ki-vilouhoksilla. Lopuksi Linzissä, Itävallassa.

Kolme vuotta hän eli jatkuvan kuoleman-han alla olosuhteissa, missä ihmistä systemati-sesti alistettiin, nöryyttettiin, pidettiin näläs-sä, pakkasessa, ruoskittiin ja murhattiin. Kun amerikkalaisten tulo vapautti hänet 1945, hän painoi 35 kiloa. Hän oli useita kuukausia sai-raalassa. Häntä painoi sukulaistensa kohalot, erityisesti rakastamansa äidin kärsimykset ja kuolema Auschwitzin tuhoamisleirillä 1942. Äitiinsä hän palaa useissa runoissaan vielä yli viidenkymmenen vuoden kuluttua. Jos haluaa, voi noista kuolemanlauluista löytää myös hi-venen kauneutta, esimerkiksi runossa *Nia sola*

posedajo kerrotaan kahden hyvin nuoren ihmisen välisestä rakkaudesta, rakastelusta yön het-kinä naisten parakin ylävuoteella – ennen kaa-sukammiota.

Päästyään sairaalasta Balbin jää Vieniin jat-kaakseen opintojaan. Vuonna 1969 hän suoritti tohtorin tutkinnon filosofiassa. Seuraavana vuonna hän muutti USA:han, jossa hänet nimi-tettiin vieraiden kielten professoriksi. Hän opetti venäjää, saksaa, ranskaa, espanjaa ja englantia.

Vuonna 1963 hän voitti ensimmäisen palkin-non Esperanton maailmanliiton kaunokirjalli-suuskilpailussa. Siitä lähtien hän on julkaisut useita runomuotoisia kertomuksia keskitysleiri-en kauhuista. Jotkut teokset ovat olleet kaksi-kielisiä: esperanto-englanti ja esperanto-puola. Hän on säänöllisesti vieraillut vuosittaisissa Esperanton maailmankongresseissa. Vielä 2003 hän oli Esperanto Akademion jäsen.

Julius Balbinin tragedia saa minut pohtimaan ihmisen kestävyyden rajoja; vaikka kehon ter-veys voitaisiin palauttaa, miten ihmisen hen-kisesti kykenee sopeutumaan normaaliiin elää-mään, aloittamaan opiskelun, kohtaamaan sen maan kansalaisia, jotka ovat häntä kiduttaneet ja tappaneet monia hänen omaisiaan ja tuhansia tovereitaan.

Miten uskoaa enää ihmiseen? Onko Julius Balbin jonkinlainen yli-ihminen? Ei ole. Men-neisyyden haamat nousevat ja piinaavat häntä yhä edelleen, varmastikin kuolemaan asti. Hän on omin korvin kuullut mittamattoman määrän turhaakin turhempia rukouksia. Johdonmukais-ta on, että hän kadotti Jumalan. Hän vihaa paa-via, joka konkreettisesti olisi voinut auttaa.

Julius Balbin purkaa tuskaansa runoissa, jotka synnyttävät minussa ensin kauhua, sitten kysymyksiä miten tällaista on voinut tapahtua. Viimeinen tunne on masennus ihmisen kehitty-mättömyyden edessä.

Kun pieni tilaisuus Prahan kongressissa, oli päättynyt, odotin kunnes muut olivat poistu-

neet. Menin hänen luokseen ja kerroin hänelle, että olin lukanut hänen runojaan eri puolilla maailmaan ilmestyneissä esperantolehdissä. Juttelimme jonkin aikaa. Lopuksi ostin hänen kirjansa, jonka kanteen hän kirjoitti omistuskirjoituksensa. Erotessamme pyysin saada purista hänen kättään. Olin tavannut ihmisen, esperantistin, joka en voi unohtaa.

Kirjan alussa on maininta, että kaikki oikeudet tekstin lainaamiseen on kielletty koko maailmassa ja kaikilla kielillä. Ei ole mahdollista käääntää joitakin runoista suomeksi, esimerkiksi kertomusta, jossa kerrotaan yli tuhannen alastomaksi riisutun naisen ja lapsen ampumisesta pitkään

kaivantoon. Tai nuoresta juutalaistyöstä, jonka leirin komentaja määräsi hänet heittäväksi lemmikkienä, tappajakoirien raadeltavaksi ja syötäväksi muiden vankien silmien edessä. Tai siitä miten kuolemanprikaatin komentaja, munkin kaapuun puettu isä Andreas Kun teloitetti ihmisiä Budapestin kaduilla ja sairaalassa. Joukkohaudan äärellä hänen komentosanat tappajille olivat: Jeesuksen pyhässä nimessä, ampukaa!

Kaiken kaikkiaan teoksessa on 116 runomuoista kertomusta maanpäällisestä helvetistä. Kirjan nimikorunoa ei ole kirjassa. Julius Balbin kuoli 2006.

Esa Lång

## Esperanto-Sumoo eniris sian kvinan jaron

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiu jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj. Unu konkurso daŭras 15 tagojn. Dum la luktokonkurso luktis-

toj estas grupigitaj en 5 grupoj. Plej fortaj luktistoj luktas en grupo nomata *Jokozuna*. Poste sekvas grupoj laŭ fortoj de luktistoj nomataj: *Oozeki*, *Sekiūake*, *Komusubi*, *Maegashira*.

Esperanto-sumoo okazas paralele kun tiu tradicia sumoo, celante progresigi nian libro-kulturon. Partoprenantoj decidas la libron, kiun ili legos kaj la kvanton de paĝoj, kiujn ili legos por unu tago. Se ili plenumas sian promeson pri la kvanto, ili gajnas unu venkon. Tiamaniere ili luktadas dum 15 tagoj, ne kontraŭ aliaj luktistoj, sed kontraŭ sia maldiligenteco.

Esperanto-sumoo komencis laŭ ideo de *Hori Jasuo* en septembro 2009 kun 18 japanaj luktistoj. Kvar jarojn poste en septembro 2013 partoprenis 146 homoj el 28 landoj. Plej grandan kvanton da partoprenantoj havis Japanio (49). Aliaj grandaj landoj estis Svislando (16), Francio (13) kaj Pollando (11). El Finnlando partoprenis 4 luktistoj.

Venonta sumoo okazos ekde la 12-a ĝis la 26-a de januaro 2014. Hori atendas vian partoprenon.

Detalojn vi vidu en la retejo: [www.esperanto-sumoo.strefa.pl](http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl)

*Carola Antskog*



*Hori Jasuo nuntempe havas multajn helpantojn, inter ili Krinjo, kiu prizorgas la hejmpaĝon kaj kreas diplomojn al ĉiuj venkintoj.*

# Bonvenon al Kroatio en EU

Por la aŭstroj tio estas korafero: Kroatio la 1-an de julio de tiu ĉi jaro aliĝis al EU kaj tiel fariĝis la 28-a membro-ŝtato de tiu komunumo. Kroatio havas 5 milionojn da enloĝantoj, ili estas laŭ religio plejparte romkatolikoj. La lando estas tre konata al la aŭstroj: Por pasigi la somerajn feriojn Kroatio estas la plej ŝatata ferioregiono sude de Aŭstrio. Precipe la marbordo estas belega, estas miloj da insuloj. Turismo estas la plej grava faktoro de la kroata ekonomio.

Post la disfalo de Jugoslavio en la jaro 1991 alvenis al Aŭstrio nova ondo da emigrantoj kaj inter ili estis multaj kroatoj. Pro ilia kultura kaj religia proksimeco al la aŭstroj la kroatoj estis bonvenaj kaj ili bone sukcesis adaptiĝi al la vivocirkonstancoj en nia lando.

Ankaŭ en mia urbo loĝas multaj kroatoj. Parte ili jam fariĝis aŭstraj civitanoj kaj la ceteraj nun pro la aliĝo de Kroatio al Eŭropa Unio ĝuas kiel EU-civitanoj preskaŭ ĉiujn rajtojn de aŭstraj civitanoj. Tio signifas ke ili havos ankaŭ politikajn rajtojn: Ili povos partopreni en municipaj balotoj kaj ankaŭ kandidatiĝi por la municipaj konsilantaroj de ilia loĝloko.

Tra la aŭtošoseo oni povas rapide kaj senprobleme alveni de Aŭstrio en Kroatio, ĉu en la ĉefurbo Zagrebo en la nordo de la lando, ĉu

en Split ĉe la maro en Dalmatio. Kaj tiu rapiida vojaĝbleco estas interesa ne nur por aŭstroj kiuj volas pasigi siajn feriojn en Istrio aŭ Dalmatio, sed ankaŭ por la kroatoj en Aŭstrio kiuj tiel povas ofte viziti siajn parencojn en la hejmlando. Tiamaniere ili tenas siajn ligojn al la devenlando kaj povas konservi sian kulturan identecon kiel kroatoj kvankam en Aŭstrio ili fariĝas germanlingvaj kaj tiel fariĝas ankaŭ parto de nia socio.

Fakte en la orienta regiono Burgenland de Aŭstrio jam de ducent jaroj vivas kroata minoritato. Ili estis vokitaj por kulti la landon kaj hodiaŭ ili estas respektindaj agrikulturistoj. Ili ludas nemalgravan rolon en la kultura ka politika vivo de Aŭstrio.

Pro ĉiuj tiuj faktoj la aliĝo de Kroatio al Eŭropa Unio trovas en Aŭstrio varman bonvenigon. Ni povas esperi ke la tutaj regionoj sudorientaj de Aŭstrio tiel faros pluan pašon al prospero en paco. Ĝuste tio ja estas la celo de la Eŭropa Unio.

*Anton Oberndorfer*

*Esperanta Retradio de 23.4.2013  
[\(http://esperantaretradio.blogspot.com/2013/04/bonvenon-al-kroatio-en-eu.html/\)](http://esperantaretradio.blogspot.com/2013/04/bonvenon-al-kroatio-en-eu.html/)*

## Viro volis fariĝi ruso

Li konsultis kuraciston faman kiel aliformiga ĥirurgo. La doktoro konsentis, ke eblas, sed tre speciala estas la operacio: Necesas fortranĉi dudek procentojn el la cerbo. La kliento konsentis – li havis sian kialon fariĝi ruso.

Kiam la paciento vekiĝis el narkozo, la ĥirurgo iom pala staris ĉe la lito kaj singardeme ekparolis: "Sinjoro, la operacio bone sukcesis, sed ni faris erareton. Ni devis detranĉi dudek procentojn el via cerbo, sed fariĝis inverse – restis nur la dudek procentoj." La viro senzorge gestis, dirante: "Âjo, det gör-

ingenting. Allt är okej, tack ska du ha."

Post kelka tempo venis al la specialisto alia kliento, kiu diris: "Rekomendis vin mia amiko, kiun vi sukcese faris svedo. Mi volas fariĝi norvego. Ĉu vi povas helpi min?" "Bedaŭrinde ne", respondis la doktoro. "Kial?" miras la transformemulo. "Vi estas fama specialisto, kial vi ne mian operacion povus fari?" "Sinjoro", klarigas la kuracisto, "la fakteto, ke vi volas fariĝi norvego, pruvas ke vi ne havas ion por foroperaci."


# Komputiloj rekonstruas pralingvojn

Kiel oni bone scias, lingvoj estas vivantaj estuloj. Ili naskiĝas, vivas kaj mortas. Ĉiutage mortas lingvoj en la tuta mondo. Kaj kun tiuj lingvoj mortas kulturaj valoroj de la homaro, al kiuj oni ne plu povas aliri. Pro tio ekzistas fakaj lingvistoj, kiuj dediĉas multajn jarojn da pena laboro por deĉifri mortintajn lingvojn. Per tio ili eltrovas gravajn informojn pri la historio, koncerne kulturon, politikon kaj komeron de antikvaj popoloj. Faka laboro tio estas.

La novaĵo estas, ke de nun komputila programo mirinde helpas en tiu laboro. Oni alnomas ĝin "tempomaŝino", ĉar ĝi faras dum kelkaj tagoj tion, kion persona laboro postulas jarojn. Oni provis la sistemon en Paskinsulo, kaj la programo rekonstruis tiel nomatajn "protolingvojn", de kiuj devenis lingvoj en Azio, Aŭstralio kaj regionoj en la Paca Oceano.

Esploristoj el Universitato de Kalifornio, en Usono, ellaboris tiun programon kaj publikigis siajn rezultojn: la komputilo sukcesis ripeti la atingojn mane faritajn de lingvistoj kun 85% da kongruo. La programo uzas konceptojn de logiko kaj statistiko por rapide atingi la samajn rezultojn. La esploristoj testis ĝin je pli ol 600 pralingvoj en la menciiita regiono, surbaze de jam kolektitaj 140.000 vortoj.

Kurioze, ke la programo montras ankaŭ la estontecon de lingvoj. Tio signifas, ke ĝi antaŭvidas la manieron, kiel lingvoj modifiĝos



laŭ pasado de la tempo – asertas la esploristoj. La komputila programo baziĝas sur la koncepto, ke lingvoj organiziĝas en maniero simila al "genealogia arbo", kun reciprokaj influoj de unuj lingvoj al aliaj. Laŭ tiuj "arboj" protolingvoj estas trunkoj, kaj modernaj lingvoj estas folioj. La proksima pašo estos rekonstrui per la programo indianajn lingvojn en Nordameriko.

Cetere, ĉu vi scivolas, en kiu lingvo estas skribita la malgranda teksto, kiu supre ilustras ĉi tiun artikolon? Ĝi estas la sanskrita.

Paulo Sergio Viana  
Esperanta Retradio de 8.3.2013  
(<http://esperantaretradio.blogspot.co.at/2013/03/komputiloj-rekonstruas-pralingvojn.html>)

## Jaettavia esitteitä

Kun tarvitset valmiin esitteen esperantosta, saat sen näppärästi tästä <http://www.esperanto.fi/elfi/Esitteet/Esperantoesite>. Esitteitä on kaksi, kannattaa tutustua niihin.

ELFI

Saluton

*Mi rakontis en somero, ke mi finas skribi Muut lehdet -artikolojn ĉi-jare. Ĉi tie estas la lasta artikolo. Eble vi trovus iun alian personon, kiu*

*skribas ĉi tie artikolojn por Esperantolehti.*

*Ĝis,*

*Jukka Noponen*

## **Muista lehdistä:**

# **Islannin kongressi ja syyspäivät Kemiönsaarella**



Oriveden Sanomat kertoi 4.7.2013 Oriveden opistolla järjestettävästä Esperanton kurssista. Kemiönsaarella ilmestyi Annonsbladet – Ilmoituslehti kirjoitti kielitasavertaisesti ruotsiksi 15.8.13 ja suomeksi 22.8.13 saman tekstin suomalaisesperantistien osallistumisesta Islannissa heinäkuussa järjestettyn Esperanton 98. maailmankongressista ja Suomen esperantoliiton syyspäivistä Kemiönsaarella syyskuussa. Turun Sanomat kirjoitti syyspäivistä 12.9. ja Åbo Underrättelser vuorostaan Islannin kongressista 19.7.

Oriveden Sanomien mukaan tämä on ensimmainen kerta, kun Oriveden opistolla opetetaan esperantoa. Kurssin opettaja tulee Liettuasta. Lehti esitti myös esperanton kielen, sen kehittämisen ja vähän kielen rakennetta.

Åbo Underrättelser kertoi lyhyesti Islannin kongressin teemasta, oikeudenmukaisesta viestinnästä, sekä osallistujamäärästä, noin 1 000 henkeä 55 maasta. Suomalaisia oli paikalla 31. Jutussa esiteltiin lyhyesti Carola Antskog ja Anna Ritamäki-Sjöstrand kielen aktiivisina käyttäjinä ja Islannin matkaajina.

Artikkeliissa esiteltiin lyhyesti esperanton keksiminen Puolassa, mainittiin, että sitä opetetaan 150 korkeakoulussa sekä 600 koulussa ympäri maailmaa. Jutussa oli mukana 10 käännettyä lyhyttä repliikkiä ruotsista esperantoksi: Hej – Saluton, Lycka till – Suceson ja muutama muu.

Turun Sanomien jutussa kerrotaan, että esperantistit eivät puhu apukielestä vaan yhteis-

kielestä. Englanti ja muut kansainväliset valtakielet ovat kanssakäymisen apu-kieliä. Lehti esitti esperantistien syyspäivien ohjelman, johon sisältyi kaksikieliseen saaris-tolaiskulttuuriin tutustuminen ja ohjelmallinen illanvietto lauantaina. Sunnuntaina ohjelmassa oli Tuomo Grundströmin johdolla keskustelu aiheesta ”Yhteiskielet meillä ja maailmassa”.

Annonsbladet – Ilmoituslehti kertoi Zamenhofin työstä esperanton kehittämiseksi 1800-luvun lopulla. Jutussa mainitaan myös syyskuinen Esperanto-liiton syyskokous Kemiönsaarella.

Lehdessä haastateltu Carola Antskog kertoi Islannin kongressin laajasta kansainvälyydestä ja osallistujien mahdollisuudesta tutustua uusiin maihin vuosittaisilla kongressimatkkoilla. Hän kertoi maan nähtävyyksistä, mm. vesiputooksista ja kuumista lähteistä, joihin käytin tutustumassa. Kongressin ohjelmaan kuului luentoja Islannista, sen historiasta ja kielestä sekä esperanton kursseja ja virallisista kielikokeita. Jutun mukaan esperanton sanasto on suureksi osaksi latinaa. Carola toteaa, että mukana on myös sanastoa germanisista ja slaavilaisista kielistä. Kieli on jokapäiväisessä käytössä ja kirjakielinen.

Helsingin Sanomissa oli 30.11. Arvo Karvisen muistikirjoitus, jonka oli laatinut hänen koulu-ja opiskelutoverinsa Aatu Moilanen.

*Jukka Noponen*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsinki Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ [www.esperanto.fi/helsinki](http://www.esperanto.fi/helsinki)  
jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530  
✉ [onni.kauppinen@pp.inet.fi](mailto:onni.kauppinen@pp.inet.fi)
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 050 329 8202  
✉ [kimmo.hannula@creavit.fi](mailto:kimmo.hannula@creavit.fi),  
[www.esperanto.fi/jyvaskyla](http://www.esperanto.fi/jyvaskyla)
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ✉ [www.esperanto.fi/oulu](http://www.esperanto.fi/oulu)  
aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurala  
✉ [matti.wallius@ebaana.net](mailto:matti.wallius@ebaana.net)
- ♦ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. ☎ [www.esperanto.fi/tampere](http://www.esperanto.fi/tampere) (Jukka Laaksonen: [jvaleto@kolumbus.fi](mailto:jvaleto@kolumbus.fi)  
☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ [tiina.oittinen@pp.inet.fi](mailto:tiina.oittinen@pp.inet.fi) ☎ 050 5494709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☎ [sylvia.h@kolumbus.fi](mailto:sylvia.h@kolumbus.fi)  
☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.  
✉ (09) 660 651 ☎ [steleto@pp.inet.fi](mailto:steleto@pp.inet.fi)
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.  
✉ [fejo@esperanto.fi](mailto:fejo@esperanto.fi). Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset

hoitavat jäsenmaksut liittoo. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 EUR tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoo voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 EUR sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 EUR. Lisätietoja jäsenyhdistysiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☎ [esperarto@phnet.fi](mailto:esperarto@phnet.fi).

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti [jormato35@gmail.com](mailto:jormato35@gmail.com) .

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkeliässä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna  
aperas dum la jaro**

**2014**

Nro	Limdato	Aperas
1/2014	28.1.	en febrero
2/2014	31.3.	en abril
3/2014	31.5.	en junio
4/2014	1.9.	en septiembre
5/2014	15.11.	en diciembre

## Ilmoitushinnat ♦ Anoncprezoj

Ulkopuolistet mainostajat /

Ekster membraro: Jäsenet / Membroj:

1/1 sivu/paðo 100 EUR	1/1 sivu/paðo 50 EUR
1/2 sivua/paðo 60 EUR	1/2 sivua/paðo 30 EUR
1/4 sivua/paðo 40 EUR	1/4 sivua/paðo 20 EUR

Sendu la anoncojn að rete al la redaktejo:

[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi) að poštē al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Itella Green



## Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

### Novaj korespondantoj de la Akademio

Post invito, interkonsento, kaj decido fare de la estraro de la Akademio fariĝis korespondantoj la jenaj personoj, ĉiu eminentaj en siaj fakoj, por naŭjara periodo, de 2013-12-15 ĝis 2022-12-15.

La Akademio sincere kaj ĝoje bonvenigas siajn novajn korespondantojn.

*Wael Al-Mahdi*, dentkuracisto kaj trejnisto pri personaj lertecoj de Bahrejno. Li verkas blogon en la angla kaj araba.

*Detlev Blanke*, specialisto pri interlingvistiko.

*Joakim Enwall*, profesoro pri la ĉina lingvo ĉe Upsala universitato. Li doktoriĝis pri la lingvo mjau (angle Miao), kiu estas parolata de nacia malplimulto en Ĉinio. Specialisto pri gravaj ne-hindeŭropaj lingvoj.

*Sabine Fiedler*, profesoro ĉe la *Institut für Anglistik*, Lepsiko. Specialisto pri frazeologio.

*Federico Gobbo*, profesiulo pri interlingvistiko kaj esperantologio. Alvenonta profesoro en Amsterdamo.

*Wim Jansen*, profesiulo pri la eŭska kaj Esperanto. Emerita profesoro en Amsterdamo.

*Ingrid Maier*, profesoro pri la rusa lingvo ĉe Upsala universitato. Specialisto pri la rusa kaj aliaj slavaj lingvoj.

*A. Giridhar Rao*, fakulo pri la angla. Flue parolas la telugu, hindian kaj urduan. *Senior Lecturer* ĉe *International Institute of Information Technology*, Hajderabado, Barato. Instruiso kaj aktivulo de la barata movado.

*Keyhan Sayadpour Zanjani*, asista profesoro pri infarktiologio. Prezidanto de la Irana Esperanto-Asocio, tradukanto de "La Florejo de Saadi" al Esperanto, kunlaborinto pri la traduko de "La rakonto de Kjet". Profesie li estas kardiologo en malsanulejo por infanoj.

*Esther Schor*, profesoro pri la angla ĉe la Universitato de Princeton, NJ, Usono. Ŝi instruas i.a. judan literaturon kaj tradukitan judan literaturon. Ŝi organizos la Esperantologian konferencon en Bonaero en 2014 kune kun *José Antonio Vergara*.

*La estraro de la Akademio de Esperanto*  
[Numero 24 – 2013 11 23]

### Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Aineisto 28.1.2014 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 28.1.2014 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <[eafgazeto@esperanto.fi](mailto:eafgazeto@esperanto.fi)>.